

N. N. 32, Jen ĉiamviva Rozo	N. N. 32, Elkreskis roz- branĉeto	N. N. 32, Es ist ein Ros entsprungen	N. N. 32, Burĝonis rozarbedo	N. N. 32, A spotless roze is growing
--------------------------------------	--	--	------------------------------------	--

*tradukita*  
*de Leland*  
*Bryant Ross*

*tradukita*  
*de Joachim*  
*Gießner*

*tradukita* *de*  
*Guido Holz*

*tradukita de N. N. 33*

Jen ĉiamviva Rozo laŭ vorto de profet' El la Jiŝaja ŝoso ekkreskis kun impet'. Ĝi venis, hela Flor', en frida tem- po vintra Je noktomeza hor'.	1. Elkres- kis roz- branĉeto el rozarbust' de Di'. Aŭguro de pro- feto rakontis jam pri ĝi. Naskiĝis roz- foret' meze en vintra nokto laŭ diro de pro- fet'.	1. Es ist ein Ros ent- sprungen aus einer Wurzel zart, wie uns die Alten sungem, von Jesse kam die Art und hat ein Blümlein bracht mitten im kalten Winter, wohl zu der halben Nacht.	1. Burĝonis roz- arbedo el delikata sin' laŭ olda kant- heredo, Jiŝaj la origin'; ekĝermis ĉarma flor' dum frosta vintro- tempo je noktomeza hor'.	1. A Spotless Rose is growing, Sprung from a tender root, Of ancient seers' fores- howing, Of Jesse promised fruit; Its fairest bud unfolds to light Amid the cold, cold winter, And in the dark mid- night.
--	--	--	--	---

Jesaja ĝin anoncis, la menciita Flor'; Maria ĝin re- sponzis el patrin-ama- kor'. Ŝi naskis Ro- zon por klarigi Dian amon Je noktomeza hor'.	2. Ja naskis tiu rozo - Jesaj' progno- zis ĝin - el sia korpo sproson Mari' la virgu- lin'. Laŭ dipotenca vol' ŝi naskis Di- infanon por tuta mond' konsol'.	2. Das Röslein, das ich meine, davon Jesaja sagt, ist Maria die reine, die uns das Blümlein bracht. Aus Gottes ewgem Rat hat sie ein Kind ge- boren und blieb ein reine Magd.	2. El virgulin' beata, mirinda roz- arbed', elvenis flor' be- nata laŭ diro de pro- fet'. Laŭ sankta Di- ordon' ŝi naskis infane- ton por nia sav' kaj bon'.	2. The Rose which I am singing, Whereof Isaiah said, Is from its sweet root springing In Mary, purest Maid; Through God's great love and might The Blessed Babe she bare us In a cold, cold winter's night.
---	---	--	---	--

...

...

...

...

...

Ĉi tiu milda Floro per sia dolĉ- arom'	3. Kaj tiu bel- floreto tre hele lumas ĝi.	3. Das Blümelein so kleine, das duftet uns so süß,	3. Kaj ĉi floreto belas, amindas per parfum';
Heligas per Digloro la vojon de la hom'.	Obskuron la brileto forprenas nun de ni.	mit seinem hellen Scheine vertreibt's die Fin- sternis:	la nokton ĝi for- pelas per sia brila lum',
Ja homo, ta- men Di', ĝi ŝarĝojn malpezi- gas Kaj homojn savas ĝi.	Vi hom' kaj ve- ra Di' el pekoj kaj suferoj estas savant' por ni.	Wahr' Mensch und wahrer Gott, hilft uns aus allem Leide, rettet von Sünd und Tod.	nin helpas el mizer', el pek' kaj mor- to savas; Li, hom' kaj Di' en ver'.

...

...

...

...

...

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros' Haruo).

Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiam1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).

Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 32.

Arg-618-1243 (2012-10-18 21:49:44)

Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en la germana evangelia eklezia kantlibro, kanto n-ro 23. Vidu ankaŭ la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Es\\_ist\\_ein\\_Ros\\_entsprungen](http://de.wikipedia.org/wiki/Es_ist_ein_Ros_entsprungen). - La teksto troviĝas ankaŭ en la retejo <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>. Tie estas aŭdebla ankaŭ la melodio.

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de GUIDO HOLZ (\*1920 - †1989).

Arg-618-1245 (2014-09-07 14:38:29)

Tiu ĉi kanto troviĝas en la eklezia Esperanta kantlibro "Adoru", n-ro 223. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/b/burgxonis1.html>. Pri Guido Holz vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido\\_Holz](http://eo.wikipedia.org/wiki/Guido_Holz).

Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en la Anglan de N. N. 33.

Arg-618-1248 (2012-10-19 08:19:20)

Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://ingeb.org/spiritua/esistein.html>.